



CONCORDE

Organe culturel

Trimestriel

Direktoro :

Hubert FERÉZ

ABONO 10 F

Tél. : 84.19.07

NICA STELO

Vers une culture, une civilisation supérieures, dans la justice, la paix,
la concorde et la collaboration entre les individus comme entre les peuples

7, Avenue de Reims

C.C. Postal TOULOUSE 632.15

NICE (Francujo)

N° 49

LE N° 2,50 F

2ème TRIMESTRE 1976

CONGRES ANNUEL DE LA FEDERATION ESPERANTISTE DE PROVENCE

sous la Présidence d'Honneur de

M. Jacques MEDECIN

Secrétaire d'Etat au Tourisme, Maire de NICE

=====

EDITORIAL - En accordant la Présidence d'Honneur au Congrès Fédéral de Provence, M. Jacques MEDECIN, Secrétaire d'Etat, Maire de NICE, Président du Conseil Général des A.M. s'est acquis la reconnaissance des Espérantistes, non seulement de Provence, mais des autres provinces. Qu'il veuille bien accepter l'expression de notre profonde et respectueuse gratitude !

MM. les députés EHRMANN et ICART, MM. les Conseillers Généraux Antoine MARTIN et Raoul BOSIO, Adjoints au Maire, ont rehaussé par leur présence l'éclat de la cérémonie de l'inauguration du Square Zamenhof. M. Antoine MARTIN nous avait déjà manifesté sa vive sympathie lors d'une rencontre à NICE avec les jeunes espérantistes de l' "Amicale des Parents d'Elèves des Cours d'Espéranto du Canton de Solliès-Pont (Var)", accompagnés de leurs parents et de leur infatigable Directeur, M. MATHIS.

Par son discours si émouvant, digne d'un véritable espérantiste, lors de la réception par la Mairie, dans les Salons du Comité des Fêtes, des Arts et des Sports, M. BOSIO, Vice-Président du Conseil Général, Adjoint au Maire de Nice, est allé droit au coeur des Espérantistes !

A tous ces éminents amis de l'Espéranto, nous confirmons notre entier dévouement à la noble mission de NICE qui, grâce à son prestige dans le monde et sa foi espérantiste, est digne, par son action internationale, d'ouvrir amplement la voie vers la paix et la concorde entre les citoyens comme entre les peuples !

Et, pour l'inspiration de tous les actes de notre vie, conservons toujours gravée dans notre coeur, la sublime devise des espérantistes : "Paco kaj Amo", Paix et Amour !

Hubert FERÉZ

=====

- IMPRESOJ PRI LA 42a KONGRESO DE LA PROVENCA FEDERACIO -

=====

Kiam mi ricevis, antaŭ kelkaj monatoj, la programon de la 42a Kongreso de la Provenca Federacio mi pensis : Estas alloga programo kiel por nacia kongreso kaj mi havis la deziron partopreni ĉar estas okazo por revidi malnovajn amikojn kiel Férez, Fiquet, k.t.p.. Vendredon la 14 an de majo posttagmeze mi alvenis en Nice kaj mi povis tuj iri al mia hotelo ĉar mi jam ricevis ĉiujn informojn dank'al nia amiko Llorens kiu, kun familio, estras la hotelon "Miron".

Bona ideo estis organizi vespere interkonatiĝan manĝon ĉe restoracio "Le Bretagne". Babilante oni povis tamen ĝui bonam manĝon je modera prezo. Tuj mi komprenis ke la ĉeforganizanto estas Norbert PAZZINI ĉar li zorgis pri ĉio kaj finfine sukcesis vespermanĝi !

(Sekvo, paĝon 2an)

Sabato matene je la naŭa, komforta aŭtobuso permesis al ni viziti la akvofalon de Gairaut kaj admiri belan panoramon.

Tre interesa vizito, kun sperta gvidanto, okazis ĉe la akvujo kaj ozona produktede Rimiez kie ni ricevus dokumentojn.

Se vi deziras bone tagmanĝi laŭ modera prezo, iru ĉe la "Cafeteria Hippodrome" en Villeneuve-Loubet. Estas libro-servo kaj vi povas elekti, inter multaj manĝaĵoj, simpatian menuon. La proksimeco de la maro permesis banpiedojn por kelkaj samideanoj !

Post tiu individua tagmanĝo, ni vizitis la glasfabrikejon de Biot. Tre interesa ĉar oni fabrikis antaŭ niaj okuloj diversajn glasojn, vazetojn, k.t.p..

Ciam per nia aŭtobuso ni iris al la inaŭguro de "Square du Docteur Zamenhof".

Atendis nin, en folkloraj kostumoj, membroj de "Lou Caireu Niĝart" kaj S-ro Raoul Bosio, vicprezidanto de la Ĝenerala konsilantaro, kiu reprezentis S-ron Jacques Médecin, Ministro pri Turismo kaj urbestro de Nice. S-ro Fernand Icart, deputito, prezidanto de la Financa Komisiono ĉe la deputita Asembleo, S-ro Ehrmann, deputito, S-ro Martin, Ĝenerala konsilanto, Majoro Mounier, k.t.p...

Parolis S-ro Parisot, prezidanto de Nic 'a grupo, S-ro Garrigue, federacia prezidanto, kaj S-ro Bosio kiu parolis pri la vivo de Dro Zamenhof kun certa kompetenteco.

Poste la urbestro akceptis nin en la salonoj de la komitato de la festoj, 5, Angla promenejo.

Por fini la tagon ni estis invititaj ĉe folkloro spektaklo en Teatro "L'Artistique".

Vere la Nicaj dancoj estas ĉarmaj precipe kun junaj dancistoj en freŝaj kostumoj, belaj kaj koloraj.

S-ino Marcelle Grossi deklamis poemojn de Louise Labbé, S-ino Fernande Cavelan kantis la aeron de Mimi, vivo de Bohemo-Puccini, S-ino J. Klein interpretis la kanzonon de Vilya de la gaja vidvino de Franz Lehar kaj la mortajn foliojn de Prevert-Kosma.

Akompanis niajn bonajn kantistinojn S-ino Lottie Ollivaud.

Humoran momenton kreis la prezidanto Georges Parisot kun "Anagramatiko" de Raymond Schwartz. La reĝisoro de la spektaklo estis la sindonema Norbert Pazzini.

Bela vespero en bona etoso !

Finfine dimanĉon ni havis la laboran kunsidon sed mi rimarkis, amare, ke la gekongresistoj ne venas akurate eĉ kelkaj ne venis konsiderante eble ke estas promenada kongreso !

Kiam venis pli akurate S-ro Raoul Bosio, reprezentanto de S-ro Médecin mi tuj diris al li : pardonu nin sed multaj kongresistoj estas lacaj pro la tro nombraj manifestacioj sed tamen ili partoprenos iom pli malfrue !

S-ro Bosio faris kiel sabato tutfavoran paroladon kaj foriris ĉar li devis prezidi aliajn manifestaciojn.

Estis bedaŭrinde ke ne venis pli multe da kongresistoj ĉar la laborkunsido estis festivalo de la parolarto !

La prezidanto Parisot kaj Garrigue elektis temojn tre interesaj por la esperantistoj, je la vidpunkto de la plibonigo de la lingva nivelo kaj de la laboro farota okazo de adopto de la leĝpropono.

Festparoladis Profesoro Beau, tio estis por mi granda ĝojo ĉar de multaj jaroj mi ne aŭdis lin kaj mi konstatis ke li ne perdis sian viglecon kaj estas fortika kiel la olivarboj temo elektita por sia festparolado.

Sed estis jam 12h.30 kaj per aŭtobuso ni atingis la stacidomon de Provenco kie atendis nin speciala trajno por iri tagmanĝi al "Auberge de la Manda" ĉe Colomars-stacidomo.

Tie la antaŭmanĝaĵoj estis tiel abundaj ke ho vere sufiĉus eble por tagmanĝo sed se niaj kongresanoj ne ŝatas la laborkunsidojn ili havas "bon coup de fourchette" kaj ili englutis trutojn, numidojn, legomojn, salatojn, fromaĝojn, glaciaĵojn, kafojn kaj ĉion akompanata de ruĝaj kaj blankaj vinoj tre bongustaj !

Feliĉe la foriro al Touët-S/Var estis nur je 16 h. kaj ni havis iom da tempo por digesti antaŭ eniri en nia speciala trajno tre pitoreska sed, ĉar estas malnovaj vagonaroj kaj reloj, kun konstanta skuado ! sed la etoso estis ĝoja (mi jam diris ke la vinoj estis bonaj).

En Touët-s/Var la urbestro akceptis nin per honora vino (nova ĝoja etoso!) kaj ni vizitis la pentrindan vilaĝon kaj la manfabrikadon de terpotoj.

Je 20 h. ni alvenis Nicen kaj okazis, kun bedaŭro, la disiĝo.

el la ĉirkaŭa arbaro, por fabriki diversajn ilojn. Ili estis lignotornistoj laborantaj hejme. Ĉiu loko havis sian propran specialan fabrikadon : en St-Claude la bukso precipe uzata (kaj estas ankoraŭ uzata) por la fabrikado de la pipoj ; kiam en Moirans oni fabrikis multajn ludilojn. Generale oni tornis la aĵojn ; estis la tornado. Junaj, maljunaj metiistoj (inoj) pentris sur la lignaĵoj kiuj, fiksitaj sur torniloj, rotaciis. Tia manlaboro nomiĝas rubandornamo.

Antaŭ kelkaj dekjaroj, miloj da lignaj fajfiloj kaj trumpetoj por infanoj estis laŭmode realigitaj en Moirans. Nun tiaj ludiloj estas eksmodaj sed ankoraŭ kelkaj laboristinoj pentras tiamaniere tenilojn de saltŝnuroj en unu aŭ du uzinoj.

Same kiel ĉie, de la lasta monda milito, la granda industrio disvolviĝis en la ĵurasa montaro kaj sekve de tio okazis grandaj ŝanĝoj en la vivmaniero de la loĝantaro. Oni konstatis la malaperon - unue, de la bredado de la brutoj, la laktindustrio enlokiĝis en la landoj proksimaj sed pli malaltaj kie ĝi estas prospera kaj produktas la bonan fromaĝon "Comté", fame konata en la mondo - due, de metiaj entreprenoj : preskaŭ ĉiuj metiistoj iĝis laboristoj laborantaj en mezgrandaj uzinoj kiuj okupas la tutan loĝantaron de la urbo.

De la malkovro de la derivaĵoj de la petrolo kaj de ilia alveno en la industrion la ligno estis multe forlasita por la fabrikado de la ludiloj. Hodiaŭ la industriistoj utiligas aliajn materialojn interalie la plaston. La injekt - kaj blovpremiloj donas grandajn eblecojn en la formado kaj la produktado.

La novaj fabrikadoj estas plej ofte orientitaj al ludiloj pli ellaboritaj, malpli statikaj kaj pli volumenaj. Generale la aŭtomatigo estas maksimume enigita en ĉiujn fabrikadojn de la premado de la eroj ĝis la kunmuntado de la ludiloj.

Ĉiun jaron la industriistoj trovas ludilojn pli allogajn laŭ la formoj kaj la koloroj. Ili havas ludilojn por ludi en somero kiel kroketoj, en vintro kiel luĝoj, por tiri malantaŭ si, por puŝi, por balanciĝi, por akiri lertecon, k.t.p. - Estas granda diverseco.

"NOREDA", uzino kiu okupas ĉirkaŭ 100 laboristojn prezentas al vendado tre belajn motorciklojn kaj traktorojn el kolora plasto kun ĉiuj akcesoraĵoj. La infanoj dezirantaj pli kaj pli imiti la plenkreskulojn per taŭga aŭtomobila ekipaĵo, la gepatroj cedas al iliaj kapricoj kaj aĉetas tiujn multekostajn ludilojn.

"SUPERJOUET", organizaĵo por la vendado, arigas sept regionajn fabrikistojn inter kiuj troviĝas la urbestro de Moirans. En 1971, ĝi havis la "OSKAR" pri eksportado de la ludiloj. Ĝi partoprenas en ekspozicioj, kiuj jare okazas en pluraj mondaj ĉefurboj : Paris, New-York, Montréal, Nuremberg, Milan, k.t.p.

Ĉiuj ludiloj fabrikitaj en lokaj uzinoj estas ekspoziciataj en magazeno situanta en la centro de Moirans-en-Montaro ; Tiu urbo estas kaj volas restadi la ludilĉefurbo en Francujo.

MADO BERTHOD - (Artiste Peintre)

DERNIERE HEURE : JOURNEE "ZAMENHOF" à CANNES, le DIMANCHE 17 OCTOBRE 1976

1°) Réunion à 11 heures 30, angle Rue Zamenhof et Croisette

2°) Banquet à 12 heures 30 à la "Brasserie des Sports", Rue de la Gendarmerie à VALLAURIS

MENU : Crudités - Charcuterie - Les Grisets à la Provençale - Gigot au four - Haricots Verts -
Pommes Dauphine - Salade - Fromages - Pâtisserie - Café - 1/2 bouteille vin -
SERVICE COMPRIS : F. 40,00

Mme FARJON - 41, Avenue Saint-Jean - 06400 - CANNES - C.C.P. 475871. R. -MARSEILLE

"LA ESPERO" - Nous présentons aujourd'hui à nos amis et lecteurs une nouvelle interprétation musicale de l'hymne sacré de Zamenhof "LA ESPERO" due au compositeur Hector BENDA (Virk), un des dévoués collaborateurs de "Concorde". A la fois simple et mélodieuse, cette version très vocale contribue à mettre davantage en valeur le texte de Zamenhof.

NOTA : Notons que le compositeur Hector BENDA est très connu et très apprécié chez les amateurs de belle et haute musique dans les cercles artistiques et salons de la Côte-d'Azur, parmi les présentations de Cannes, de l'Opéra de Nice, de Monte-Carlo, à San-Remo, au "Printemps Musical 76" de l'Opéra de Nice, à côté des célèbres compositeurs Beethoven, Berlioz, Liszt, Mozart, Rossini, Schubert.

---o---

Vojaĝo al MALTA en Marto 1976

Antaŭ ol foriri al MALTO, ni skribis al la Prezidanto de la Esperantista Grupo. Ek nia alveno al la hotelo ni havis la feliĉan surprizon vidi Sinjoron MALLIA, kiu venis, en la nomo de sia grupo, bonvenigi al ni. Tio revarmigis la koron !

Post tri tagoj Sno MALLIA prenis nin al la hotelo por renkonti parton de la aliaj membroj de la grupo. Ni alvenas antaŭ la beleta domo, freŝdate konstruita, de la sekretario Sno VELLA-BONDIN ; tiu domo nomiĝas "La Espero". La proprietulo vizitigas ĝin al ni : ĝi estas vasta, tre klara kaj ni sincere gratulas Snon VELLA.

Eni rante en la vastan salonon, ni distingas ekspozicion de esperantistaj libroj kaj revuoj, kun verdaj flagetoj kaj verda stelo. Oni prezentas al ni kelkajn samideanojn, inter kiuj la Kasiston, kiu instruas la esperantistan lingvon en lernejo, tre simpatian policanon kaj aliajn geojn feliĉaj renkonti francajn amikojn.

Estas ankaŭ multe da infanoj ; tiuj de Sno MALLIA parkere deklamas la Espero kaj la Nia Patra preĝon senhezite. Tiu tuta juneco jam konas la rudimentojn de la internacia lingvo kaj tio estas tre esperiga.

La etoso estas tre ripozigita kaj ni trinkas, ni manĝas kun amikoj nekonataj antaŭ kelkaj momentoj sed kiuj ŝajnas al ni konataj de ĉiam.

Samideano rekondukas nin al nia hotelo, sed ni haltadis ĉe li ĉar li volas ankaŭ trinki al ni la amikecan glason, kaj konigas al ni lian beletan domon.

Nia Malta restado agrable daŭrigas intermitita per malgrandaj promenadoj kaj ekskursoj per aŭtobuso. Neniam ni pensis ke tiu insuleto entenas tiom da belecaĵoj kaj arkeologiaj trezoroj. Je ĉiu promeno ni estas ravaj.

Antaŭ la fino de nia restado, ni iras adiaŭi al la Prezidanto Sno MALLIA. Pro tio ni prenas al Valetta la aŭtobuson, kiu kondukas nin al VITTORIOSA, kiu estas unu el la tri urbetoj satelitaj de la ĉefurbo. Ni serĉas la domon de la familio MALLIA, kaj afable, virino eskortas nin. Dum nia restado ni povis ŝati la afablecon de la Maltoj ; estis ĉiam iu por informi nin, kiam ni devojiĝintis.

La ĝemeloj de Gesinj. MALLIA akceptas nin kaj perfekte respondas al niaj kelkaj frazoj esperante. Tie ni pasigis agrablajn momentojn gustumante la bongustegajn "Cheese Kake", speco de folikuko farĉita per freŝa blanka fromaĝo, kaj trinkante la insulan vinon "Lacryma Vitis".

Ni rave aŭskultas la admirindan sopranan voĉon de Sno MALLIA, kiu kantas la grandajn operojn en la teatro de VALETTA : La Traviata, la Tosca, la Vie de Bohème, k.t.p. Vere ni estas superfavorintaj !

Sno MALLIA montras al ni sian laborĉambron, kie ni vidas ĉiujn liajn esperantajn kaj anglajn diplomojn. Ni legas liajn poemojn en esperanto kaj eĉ en franca lingvo. Ni iras de miro al miro !

Ni adiaŭas niajn gastigantojn, kiuj insistas por rekonduki nin ĝis nia aŭtobuso, promesante reciproke revidi aŭ en Francio aŭ en Malto.

Dum tiu eksterlanda vojaĝo ni tre ekkonciis, kiom la esperanta lingvo estas amika kaj profunda ligilo inter ĉiuj samideanoj.

Kia bela kaj riĉiga vojaĝo !!

Gesinjoroj LENOIR

=====

- LA UNIVERSALA KONGRESO EN ATENO -

Tiu Kongreso estis tre rimarkinda pro la brila atmosfero, la amika etoso, la laboroj faritaj. De la franca flanko oni tre fieris, ĉar la bulgaraj artistoj ludis teatraĵon de Molière "Les Femmes Savantes".

La malfermo de la Kongreso okazis en la granda Hotelo HILTON, por la 1200 gekongresistoj.

Grupoj de responduloj estis akceptitaj de la Ministro por Kulturo kaj de la Urbestro.

Francaj edukistoj estis akceptitaj de la Direktoro de la Franca Instituto.

La Sola malfeliĉo estis la morto de nia franca komitatano Sro BUDIMIR de Lyon. Bicikle li revenis al Francio kaj Greka aŭtomobilisto mortigis lin. Ni prezentas niajn sincerajn kondoleancojn al Sino BUDIMIR.

J. GUILLAUME

Vic-Prezidanto de U.F.E.

Cef-delegito de U.E.A. Sekretario
de la Aŭtomobila Klubo

KONKORDO bedaŭregas tiun maljustan kaj kruelan eventon, kiu afliktas la familion BUDIMIR kaj senigas la grupon de Lyon kaj nin ĉiujn de valora komitatano kaj samideano. Ni petas la familion kaj la Grupon tiom kruele trafitaj akcepti niajn sincerajn kondoleancojn.

=====

ESPERANTO EN TEATRO

=====

Jam de pluraj jaroj, S-ino Marcelle TASSENCOURT, estrino de la Teatro Montasier., kaj Thierry MEAULNIER de la Franca Akademio, organizas en Versajlo ĉiujaran junularan teatro-konkurson. Partoprenas ĝin lernejoj, kulturdomoj, amatoraj grupoj. Ĉi-jare, por la unuafojo, prezentis sin tie la Teatro Esperanto el PARTIZC, montrante "Andromakar" de J. Racine (tradukis G. Lagrange)...

La ĉefa celo de tiu prezentado ne estis gajni premion, sed aŭdigi Esperanton, tiel pruvante, ke ĝi estas vivanta lingvo, ke oni povas pere de ĝi esprimi ĉiujnsentojn. La trupo plene sukcesis en tio: la spektantoj, neesperantistoj, atente aŭskultis kaj eĉ ŝajnis kompreni kaj ŝati. La juĝantaro samopiniis, kaj la TEP ricevis specialan premion por la bela enscenigo.

(El Heroldo de Esperanto)

=====

FONDS DE SOLIDARITE

=====

BOUYNE Noëlla 20 F
IMELDI Quirin 10 F
CANIS Bernadette 5 F

FIQUET Raymond 50 F
GRANIER Marcel 10 F
Sro MAS 50 F
Mme PAUCOT 50 F

MERCI à tous pour cet amical soutien !

G A P - 05 : En Novembre 1975, ni sukcesis, kiel planite, malfermi kurson. 7 personoj interesiĝis, sed neniu el ili povis ĉeesti regule. Nur unu preskaŭ finis la kurson en bonegaj kondiĉoj kaj kapablas uzi la lingvon. En aŭtuno ni organizos konkurson-referendumon laŭ la temo : "Laŭ vi, kiujn kvalitoj devus posedi mondlingvo ?". Tiu konkurso okazos en kunordigo de aranĝo de speciala plenaera budo sur la publika ĉiusemajna merkatejo. Kompreneble la celo de tiu agado estas la varbado de novaj kursanoj. Roger COLNEY

NICE - 06 :- Groupe Espérantiste : AVIS IMPORTANT - Désormais, les réunions mensuelles se tiendront à l'HOTEL DU LOUVRE (Mairie Annexe), 20 Bd Victor-Hugo, à 18 h.30 (petit bureau à l'entresol, à gauche) le 1er Mardi de chaque mois . Georges PARISOT

- Matinée Espérantiste et folklorique : Cette matinée aura lieu le Samedi 2 Octobre 1976, à 16 heures, à la Maison des Jeunes de Magnan, avec le concours du groupe niçois "Le Caïreu Niçart" et une causerie sur l'Espéranto, par M. G. PARISOT, seront du programme.

- L'assemblée générale annuelle et le Banquet sont prévus pour le 28 Novembre 1976. Réservez cette journée.

TOULON - 83 : Tie la "afero" komenciĝas bone. S-ino Fernande CAVELAN instruas kvin gelernantojn, kiuj venas hejmen ĉiumerkrede, je la tria posttagmeze. Ili poste, povas ludi je la tabloteniso en nia kelo, kaj eĉ kuris, kiam ili bezonas, en nia ĝardeno.

Poste, je la 5a ptm, mi iras en la urbon, por gvidi kurson por la atesto pri lernado. Vendredon, mi gvidas kurson en la sama ĉambro, por la atesto pri praktika lernado. Sinjoroj CLAIR kaj AMAT, kiuj havas la ateston pri kapableco, estas la korektantoj. Ili venas bejmen por elekti la provojn.

Lastfoje venis hejmen pedagogia konsilisto el C.E.S. Henri Wallon en LA SEYNE. Ili petis de mi, kun la helpo de mie edzino, fari kurson ne nur poe gelernantoj, sed ankaŭ por kelkaj gepatroj. Mi iras mardon je la 5a p.t.m. por gvidi kurson en tiu lernejo

Pierre CAVELAN

Niajn dankojn kaj gratulon al Pierre Cavelan kies nun tuta familio praktikas Esperanton ! (La Redakcio)

Laŭ nia Celo !

Mi komunikas al niaj geamikoj leteron kiu tre kortuŝis min, kaj kiu estas por ni ĉiuj valora kuraĝigo !

"Al Hubert FERREZ,

"Je vous fais part de la bonne réception de votre courrier en date du 14 courant et vous remercie de l'envoi de la documentation demandée."

"C'est avec une joie réelle que j'accepterai d'entrer dans votre grande famille.

"Je l'accepte en raison de mon souci de l'individu, broyé par la Société anonyme, en raison de mes besoins de chaleur humaine, par delà les barrières matérielle, morale et culturelle, en raison de mes aspirations à un monde serein, fraternel, sans injustice, en raison de la vie que j'aime, où l'homme n'en est qu'un représentant, quand il peut en devenir la calamité avec tout l'irréparable que cela sous-entend.

"Je veux apprendre l'Espéranto. A bientôt de vous lire. Mes derniers mots seront les témoins de mes meilleurs sentiments.

DESCHAMPS Jean-Claude

=====

PERMANENTA KALENDARO (daŭrigo)

REGUSTIGO - Mi bedaŭras preseraron en la lasta numero de Konkordo. 1980 havos la ciferojn 1 kaj 2. Por memori la ciferojn de la monatoj estas memotekniko por la Francoj :

- Januaro : mois des cadeaux = 0 nulo
- Februaro : les jours deviennent courts, étroits = 3
- Marto : la tria monato de la jaro = 3
- Aprilo : poisson d'avril = scie (un poisson) = 6
- Majo : mois des parfums = 1
- Junio : mois des examens ; on se met en 4 = 4
- Julio : Feu d'artifice = 6
- Aùgusto : Vacances ; il est agréable de partir à deux = 2
- Septembro : Ouverture de la chasse, le sport en plein air es'rsain = 5
- Oktobro : 0 = nulo
- Novembro : Les jours redeviennent courts, étroits = 3
- Décembro : Noël, mois saint = 5

La cifero de 1976 (atentu pri la superjaroj) estis 3 ĝis la 29 de februaro kaj 4 poste. Do 1977 havos la ciferon 5 ; 1978, la ciferon 6; 1979, la ciferon 7 = 0, ĉar ĉiam oni dividas per 7. 1980 estos superjaro do la cifero estos 1, kaj post februaro 2, k.t.p. Ĉiujare vi aldonas 1 escepte por la superjaroj Kiel trovi la ciferon de 1918 aù 1945 ekzemple ? Mi sciigas vin ke 1900 ne estis superjara. 1901 havis la ciferon 1, 1902, la ciferon 2, k.t.p. Sed 1904 estis superjara, do ĝi havis la ciferon 4 ĝis fino de februaro kaj 5 poste. Ni konkludas ke 1921 ekzemple ne havis la ciferon tri ($\frac{21}{7}$) ĉar de 1901 ĝis 1921 okazis 5 superjaroj. Ĉiuj kvar jaroj aldonas 1 al la nom-


bro. Do 1921 havis la ciferon $\frac{21 + 5}{7}$ restas 5 (la resto de la divido estas la cifero de la jaro.

Ekzemploj : kia tago estis la 11a de Novembre 1918 ? Ĝis 1918 okazis 4 superjaroj, do la cifero de 1918 estas : ($\frac{18 + 4}{7}$) , restas 1. La 11a de Novembro 1918 estis : ($\frac{11 + 3 + 1}{7}$) restas 1 = lundo. Vivu la Paco !

La 8a de Majo 1945. De 1900 ĝis 1945 okazis 45 : 4 = 11 superjaroj, do la cifero de 1945 estis : (45 + 11) : 7 restas 0 = nulo. La 8a de Majo 1945 estis : (8 + 0 + 1) : 7 restas 2 = mardo. La 1a de Majo 1945 estis : 0 + 1 + 1 = 2 = Mardo. Estas klera, ĉu ne ? Nun ekzercu vin por trovi la tagojn de via naskiĝdato aù edziniĝo aù de naskiĝdatoj de viaj infanoj, tagojn kiujn vi konas.

Vi ne plu bezonas kalendarojn !

EDERESPERO



DANKESPRIMO

A Georges PARISOT, Président du groupe Espérantiste de NICE et à tous les participants au Congrès Fédéral :

"J'ai été très touché des messages et cartes postales que vous avez eu la délicate et fraternelle pensée de m'adresser au cours des diverses réunions du Congrès ; En compatissant à ma grande désillusion de ne pouvoir, par suite de mon état de santé, être des vôtres lors de notre grande réjouissance régionale, vous m'avez ainsi permis de me sentir plus près de vous à ces belles manifestations de notre idéal ! De tout coeur, Merci !

Hubert FERÉZ



DANS LE PROCHAIN NUMERO DE "CONCORDE" :

ESPERANTISTE

- a) Article de Roger COLNEY sur "ASSOCIATION POSTALE"
- b) "Frاندemula ANGULO" de Georges PARISOT

Le GERANT : Hubert FERÉZ

Imprimerie : CENTRAL COPIES - 8, descente Crotti - 06300 NICE - Tél. : 85-92-52

VILLE DE NICE

THEATRE MUNICIPAL DE L'OPERA

PRINTEMPS MUSICAL 76

Samedi 8 Mai à 17 heures

Concerto en fa majeur K V 459 W. A. MOZART
pour piano et orchestre
Concerto N° 1 en ré bémol majeur, opus 10 S. PROKOFIEV
pour piano et orchestre
Le Tasso (Poème Symphonique) F. LISZT
Le Festin de l'Araignée A. ROUSSEL
L'Apprenti Sorcier P. DUKAS

Soliste :

OLIVIER GARDON

PIANISTE

Direction :

JEAN LAPIERRE

Samedi 15 Mai à 17 heures

Ouverture du Carnaval Romain H. BERLIOZ
Concerto N° 4 en do mineur C. SAINT-SAENS
pour piano et orchestre
Fantaisie Hongroise F. LISZT
La Mer C. DEBUSSY

Soliste :

RAFFI PETROSSIAN

PIANISTE

Direction :

RICHARD BLAREAU

Samedi 22 Mai à 17 heures

Symphonie N° 23 en ré majeur KV 181 W. A. MOZART
Concerto N° 1, opus 182 K. REINECKE
pour harpe et orchestre
Symphonie N° 5 D. CHOSTAKOVITCH

Soliste :

ELISABETH FONTAN-BINOCHÉ

HARPISTE

Direction :

GIANFRANCO MASINI

Samedi 29 Mai à 17 heures

La Création du Monde D. MILHAUD
Concerto en mi mineur pour violoncelle et orchestre E. ELGAR
Dialogue (1^{re} audition) P. MONTEPELLIER
La Valse M. RAVEL

Solistes :

GEOFFREY RUTKOWSKI

VIOLONCELLISTE

HENRI MAZIOUX

VIOLONISTE

Direction :

PIERRE MONTEPELLIER

Samedi 5 Juin à 17 heures

FESTIVAL BEETHOVEN

Léonore III (ouverture)
Concerto en ré majeur pour violon et orchestre
Symphonie N° 7 en la majeur, opus 92

Soliste :

NELL GOTKOVSKY

VIOLONISTE

Direction :

JEAN LAPIERRE

Samedi 12 Juin à 17 heures

ORCHESTRE SYMPHONIQUE DE SAN REMO

La Cenerentola (ouverture) G. ROSSINI
Symphonie N° 5 en si bémol majeur F. SCHUBERT
Sérénade pour instruments à vent, N. RIMSKI-KORSAKOV
Pensée Tzigane (Allegro de Concert) H. BENDA
Capriccio Espagnol N. RIMSKI-KORSAKOV

Direction :

CAL STEWART KELLOG

ORCHESTRE PHILHARMONIQUE DE NICE

(A l'exception du 12 Juin 1976)

ABONNEMENTS POUR 6 CONCERTS : 80 et 70 F — PRIX DES PLACES : de 4 à 18 F

Les Abonnements seront délivrés à l'Opéra les jours ci-après : Mercredi 5 Mai pour les personnes se présentant directement aux guichets.

Jeudi 6 Mai, par Téléphone ou Correspondance et dans la mesure des places disponibles

La location pour chaque concert débutera la veille

HEURES D'OUVERTURE DES GUICHETS : de 9 h 30 à 12 h et de 14 h 30 à 18 h 30

Téléphone : 85.67.31

(La direction se réserve le droit de modifier ce programme en cas de circonstances imprévues)

LA ESPERO



D^r ZAMENHOF



LA ESPERO

Esperanta Poemo

Muziko de **VIRK**

D^{ro} ZAMENHOF

Animato (♩ = 96)

Piano *f* *risoluto*

Kanto *mf* *Deciso*

En la mon - don ve - nis no - va sen - to Tra la

9 10 11 12

mon - do i - ras for - ta vo - ko Per flu -

13 14 15 16

gi - loj de fa - ci - la ven - to Nun de

17 19 *poco rit* 20

lo - ko flu - gu gi al lo - ko

cresc *poco rit*

Energico (a tempo)

21 *f* Ne al gla - vo san - gon so - i - fan - ta

22 23 24

f a tempo

25 26 27 28

Gi la ho - man ti - ras fa - mi - li - on:

29 *cresc* ... 30 ... 31 32

Al la mon - do e - ter - ne mi - li - tan - ta

cresc ...

33 *poco rall*... 34 ... 35 1_2 36 *rit* ...

Gi pro - me - sas sank - tan har - mo - ni -

poco rall... *rit* ...

37 *a tempo* 38 39 *rit* ... 40

on Sub la ben' e - fek - ti - vi - gos

a tempo *rit* ...

-2-

Sub la sankta signo de l'Espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj
Kaj rapide creskas la afero
Per laboro de la Esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj
Per la sankta amo disbatitaj.

-3-

Sur neutrala lingva fundamento
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝas
Ĝis la bela sonĝo de l'homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.